

Eduard Möricke,  
Dum meza nokto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Eksonĝis kalme la vesper',  
la nokto venis al la ter',  
la oraj pelvoj de la temp-pesil'  
egale kuŝas nun en la trankvil';  
kuraĝe fluas de l' supro de l' mont'  
kaj kantas susure la akvoj de l' font'  
pri l' tago,  
pri la tago hodiaŭ estinta.

Pradormo-kant' de l' nokto patrin' -  
la fonto ne atentis ĝin;  
la fuĝaj tago-horoj plaĉas pli  
sub la ĉiela dolĉa blu' al ĝi.  
Kaj ĉiam parolas de l' fonto la flu',  
rakontas la akvoj dormante eĉ plu  
pri l' tago,  
pri l' tago hodiaŭ estinta.

*Traduko de la Germana poemo "Um Mitternacht" de EDUARD MÖRICKE (Eduardo Mojriko, \*1804-09-08 - †1875-06-04) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984-06-11.*

MR-100-3 / Arg-759-1525 (2013-01-05 10:13:45)

Eduard Möricke,  
Um Mitternacht

Gelassen stieg die Nacht ans Land,  
Lehnt träumend an der Berge Wand,  
Ihr Auge sieht die goldne Waage nun  
Der Zeit in gleichen Schalen stille ruhn;  
Und kecker rauschen die Quellen hervor,  
Sie singen der Mutter, der Nacht, ins Ohr  
Vom Tage,  
Vom heute gewesenem Tage.

Das uralte alte Schlummerlied,  
Sie achtet's nicht, sie ist es müd;  
Ihr klingt des Himmels Bläue süßer noch,  
Der flücht'gen Stunden gleichgeschwungnes Joch.  
Doch immer behalten die Quellen das Wort,  
Es singen die Wasser im Schläfe noch fort  
Vom Tage,  
Vom heute gewesenem Tage.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas EDUARD MÖRICKE (Eduardo Mojriko, \*1804-09-08 - †1875-06-04).*

Arg-759-1524 (2013-01-05 10:10:06)

Vidu ankaŭ: [http://gedichte.xbib.de/M%F6rike\\_gedicht\\_Um+Mitternacht.htm](http://gedichte.xbib.de/M%F6rike_gedicht_Um+Mitternacht.htm) kaj [http://eo.wikipedia.org/wiki/Eduard\\_M%C3%B6ricke](http://eo.wikipedia.org/wiki/Eduard_M%C3%B6ricke).